

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Mars 1944

32 årg. Nr 3

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

Karlskoga

samlingsplats för Sveriges
esperantister pingsten 1944

Karlskoga. Bakom småstugor i förgrunden ser man deras kontrast: det nya stadshuset. Bortom staden blänken Möckeln. 2 Det världsfamnande "bolagets" högborg. 3 Den gamla kyrkan.

Karlskoga, till yttinnehållet Sveriges största stad, den värmäländska kanonstaden, kommer att kalla Sveriges Esperantister till kongress under pingstdagarna.

Karlskoga Esperantoförening "La Aglo" fick i början av januari förfrågan från Svenska Esperantoförbundets styrelse om föreningen vore villig organisera Svenska Esperanto-Förbundets årskongress 1944. Den 13 januari kallade ordföranden till extra möte. Efter en kort diskussion beslöts, att vi skulle åtaga oss det ansvarsfulla uppdraget. Kommittéer tillsattes och dessa började sitt arbete omedelbart.

Kommittéerna ha nu undanstökad det värsta förarbetet. Kongressprogrammet är klart i stora drag, och i aprilnumret kommer att införas det definitiva programmet med en närmare presentation av Karlskoga, en ung stad med 29.000 inv., dess vackra och moderna stadshus och stadshotell, dess ståtliga älgar, som gå fritt i skogarna inom dess gränser, m. m., m. m.


Vi vilja dock redan nu rikta en vädjan till landets samtliga esperantister att reservera pingsthelgen för kongressen och vara beredda att utan dröjsmål insända anmälan om deltagande å de ansökningsblanketter, som medfölja som bilaga till aprilnumret.

Vi förvänta, att den värmäländska kanonmetropolen skall verka särskilt lockande samt att anslutningen blir rekordartad.

Alltså, väl mött i Karlskoga Bergslag i pingst och ett hjärtligt välkommen!

Karlskoga i februari 1944.

K o m m i t t e r a d e.



Esperanto kaj la rifuĝintoj.

Ĉu la milito ne donas al ni specialan taskon?

La svedaj esperantistoj ne sukcesis kontakti kun la multaj rifuĝintoj, kiuj venis al nia lando. En Svislando, kie ankoraŭ pli da rifuĝintoj trovis okazan hejmon, oni ankoraŭ kredis neeble kontakti kun ili, sed tie la rifuĝintoj prenis la iniciaton kaj la sekvanta letero presita en Svisa Espero montras ke certa kunlaboro estas organizita.

La letero tekstas jene:

En oktobro 1942 mi alvenis kiel franca rifuĝinto al la kampo Girenbad apud Hinwil, kie troviĝis 350 diversaciaj rifuĝintoj parolintaj diversajn lingvojn kaj dialektojn. Ofte unu ne komprenis la alian kaj miskomprenoj inter ni estis oftaj. Do ni prenis decidon organizi Esperanto-kurson.

S-ro Hans Jakob, direktoro de UEA, estis tiel afabla sendi al mi la Cseh-metodan lernolibron kaj la ceteran necesan materialon por gvidi kurson. Ankaŭ s-ro O. Walder, la prezidanto de SES sendis al mi propagandan materialon. Do mi organizis propagand-vesperon kun la permeso de la milit-gvidantoj de nia kampo kaj sukcesis komenci la kurson kun 50 lernantoj. Kiel kutime, kelkaj el ili dum la kurso forsplitis sed 30 elteneme kaj fidele daŭrigis ĝis fine. Kiam mi devis foriri al laborkampo Birmensdorf, unu el la iamaj lernantoj, s-ro Fantl, kun sukceso gvidis novan kurson.

Ĉiam mi faris mian eblon kontakti kun la svisaj esperantistoj kaj de ili mi ricevis ĉiam helpon por disvastigi nian lingvon inter la rifuĝintoj. Precipe s-ro Walder donis al mi grandan helpon por organizi kursojn kaj la CK bonvolis decidi sendi la gazeton Svisa Espero senpage al miaj plej favoraj lernantoj.

Kelkfoje estis tamen tre malfacile gvidi tiajn kursojn, ĉar en laborkampo Birmensdorf multaj rifuĝintoj estis devigataj ŝanĝi la kampon kaj ankaŭ mi estis devigata forlasi Birmensdorf. Tiam mi venis al la Umschulungslager Zürichhorn. Dank' al s-ro Degen de la centra oficejo por la rifuĝintoj estis al mi permesite daŭrigi la komencitan kurson en Birmensdorf. Kaj eĉ la vojaĝoj tien estis pagitaj! Dum la lasta tempo mi gvidis interesan kurson helpe de mia lerninto s-ro Samuel, por 20 viglaj lernantoj.

Post la aperigo de artikolo en la gazeto "Die Nation" nia kampgvidanto s-ro Zjörjen demandis min, ĉu mi volas organizi kurson! Tiu kurso komencis la 11-an de Januaro kaj jam kalkulas 40 enskribojn! En diversaj aliaj kampoj de Svisujo la esperantistaj rifuĝintoj organizis kursojn: en Büren a. A., Wald, Sonnenberg.

Dum mia restado en Svislando, precipe dum mia 5-monata laborado en Birmensdorf, mi estis forsendita al diversaj laborlokoj, ekz. Perroy, Gwatt kaj Frauenfeld. Ĉie mi vizitis la svisajn esperantistojn kaj vere amike mi estis akceptita de ĉiuj. Tial mi profitas de tiu okazo por korege danki al ĉiuj miaj novaj Esperanto-amikoj.

M. Mendlewicz.

La svisaj esperantistoj subtenis tiun entreprenon de s-ro M. sendante gazetojn, lernolibrojn ktp kaj petas pri ankoraŭ pli da donacoj ankaŭ en formo de monsumoj pli malpli grandaj.

*

La svedoj devus pli fervore ree pritrakti la demandon pri disvastigo de esperanto inter la rifuĝintoj en nia lando. Se tio daŭre montriĝus tro malfacila, ni proponas ke ni svedoj provos trovi manieron subteni la svisojn je tiu treege grava laboro.

Esperanto en la praktiko.

Estis en la jaro 1941. Iun tagon unu el miaj amikoj petis min helpi al li formuli petskribon al "Radiotjänst" por pere de la radio sendi saluton al norvega balenkaptisto pri kiu la familio en Norvegujo ne aŭdis ion, nek ricevis iun subtenon de post la germana okupado de tiu lando.

Diversmaniere la norvega edzino provis kontakti kun sia edzo, sed ĉiuj provoj malsukcesis. Nun ŝi do skribis al siaj parencoj en Arvika kaj petis ilin esplori, ĉu la edzo ankoraŭ vivas. Komprenoble mi helpis mian amikon formuli la leteron al Radiotjänst, sed post kelka tempo venis la respondo, ke oni bedaŭrinde devas malakcepti la peton, ĉar oni jam devis rifuzi al svedoj sendi salutojn al la granda nombro da svedaj maristoj, kiuj pro la milito izoliĝis de siaj proksimuloj.

Kion vi nun faros? Ĉu vi volas transdoni la komision serĉi lin al mi? mi demandis. Kiamaniere vi do agos? Ho, ni esperantistoj havas proprajn "konsulojn" ĉie en la mondo, kiuj ĉiam pretas servi al la tutmonda esperantistaro! Komprenoble mi ne volis preterlasi tiel bonan okazon porpagandi kaj "fanfaroni" pri la graveco de Esperanto! Donu al mi la necesajn informojn pri la norvego kaj mi skribos leteron al unu el niaj konsuloj! La informojn mi ricevis kaj vespere mi foliumis la jarlibron de IEL por serĉi "konsulon", kiu helpu al mi pravi la praktikan utilon de la lingvo. La lasta konata adreso de la norvego estis al la kompanio ĉe kiu li servis. Ĝia centro troviĝas en Cape Town, do en Sud-Afriko. Laŭ la jarlibro troviĝas delegito de IEL en Varmbad. Ĉi tiu loko ja situas tre malproksime de Cape Town, sed mi tamen adreŝis la petskribon tien.

Nur daŭris du semajnojn antaŭ ol la respondo alvenis de la delegito s-ro J. Semmelink, en kiu li kunsendas la novan adreson al la norvego.

Pro la milito s-ro Semmelink ankaŭ mem perdis la kontakton kun sia familio, kiu loĝis en Nederlando. Li nun kaptis la okazon peti al mi, ke mi helpu al li ricevi kontakton leteran kun la familio en Nederlando. Li jam petis helpon de delegitoj el Belgio, Portugalio k. a., sed ne sukcesis ricevi iun kontakton, ĉar oni ne permesis sendi leterojn inter anglaj kaj germanaj teritorioj. Espereble vi sukcesu, ĉar via lando estas neŭtrala! !

Kun ĝojo mi plenumis lian deziron kaj ankaŭ sukcesis, ĉar ne longe daŭris ĝis lia familio en Nederlando sendis respondon je lia unua letero, kiun mi sendis al Sud-Afriko. Venis pluraj leteroj el Afriko, kiujn mi transsendis kaj juĝante laŭ la nombro da leteroj la familio nepre estis "modela" familio laŭ la postuloj de profesoro Myrdal!

Dank al Esperanto kaj al la delegita sistemo de IEL do eblis al ni helpi unu la alian eĉ dum milita tempo. De tempo al tempo aperas alvokoj de la sveda ĉefdelegito de IEL, en kiuj li petas nin aliĝi kiel delegitojn al IEL. En tro granda nombro da lokoj en nia lando mankas tiaj delegitoj kaj komprenoble la ĉefdelegito deziras kompletigi la liston por ke neniu loko estu sen "konsulo". Ĉu ne vi, kiu eventuale legas ĉi tiun artikolon anoncu vin kiel delegiton. Ĉu ne vi deziras partopreni aktive en la laboro utiligi la lingvon en la praktikon. Des pli da delegitoj des pli forta kaj valora estos la delegita sistemo!

Do ne prokrastu vian aliĝon, sed anoncu vin senprokraste al s-ro Karl Wästfelt, Stockholm, kiu certe volonte informas vin pri la labortaskoj de IEL.

Per ĉi tiu artikolo mi antaŭ ĉio celis atentigi vin pri la utilo de la "servoj" de la delegitoj. Post la milito la bezono de servoj kaj la nombro da helpetantoj certe estos tre granda, ĉar pro la milito multaj personoj perdis la kontakton kun siaj familioj. La tutmonda esperantistaro en Esperanto havas bonan kaj valoran rimedon, per kiu ni povas helpi kaj servi. Ĉu ni ne uzu ĝin kaj pligrandigu la nombron da delegitoj?

E. Hult.

Malgranda Revuo.

N-ro 1 1944 aperis. Prezo 1 kr., je mendo de minimume 10 ekz. 0:80 kr.

Stellan Engholm, Skolg. 9, Ludvika.
Postgiro 26 80 23.

KOM IHAG att skaffa Dig "Nylén-boken" nu, medan den finns att få! 2 kr. (plus porto och oms.) kostar den bara.

STORA UPPGIFTER EFTER KRIGET.

**Världskongress till Sverige,
moderna broschyrer,
handbok m.m.**

**Propagandakassan måste höjas från
4,000 till 10,000 kr.**

Kriget nalkas sitt slut, det är tydligt. De internationella förbindelserna kunna tas upp på nytt. Då skall esperanto blomstra upp. Då får esperanto ny chans att göra sig gällande, att bli det medel att förbrödra folken, som vi alltid drömt om.

Slagna, undertryckta och förlamade äro de flesta ländernas esperanto-förbund. Men i Sverige har vår rörelse under hela kriget haft sin frihet. Vi ha beretts möjlighet att hålla esperanto-rörelsen vid liv. Och trots att vi varit avstängda från utlandet, varigenom nyrekryteringen minskats eller omöjliggjorts, har vårt land att uppvisa dugliga esperanto-ledare i hundratal, esperantister, som skola föra esperanto framåt på sin plats, inom sitt distrikt eller i hela landet. Många ha även energiskt förkovrat sig språkligt genom att avlägga esperanto-examen.

Vi torde alltså ifråga om persontillgång vara tämligen lyckligt lottade. Men äro vi även ekonomiskt rustade? — Nej, tyvärr inte! Vår Propagandafond, ur vilken vi skulle kunna ta medel för speciella propagandaändamål, har ökat mycket obetydligt under de senaste åren. Våra ansträngningar ha inriktats åt annat håll. Men nu få vi inte längre dröja med att beväpna oss med pengar. Ty vi ha många uppgifter som möta oss.

Krigets slut kommer att finna de flesta länder i Europa antingen utmattade eller ödelagda, mer eller mindre. Sverige intar en undantagsställning, åtminstone vill det synas så just nu. Är det då inte vår plikt att bjuda världens esperantister välkomna till den första världskongressen! Den skulle exempelvis kunna förläggas till Malmö. Men en sådan kongress måste bygga på helt andra förutsättningar än föregående kongresser. Ty de ekonomiska förutsättningarna för utlänningarnas deltagande äro mycket små. De brukliga höga kongressavgifterna kunna väl knappast hållas. För kongressarrangören blir det alltså svårare att få inkomster

och utgifter att gå ihop. Och kanske man måste bli tvungen att minska på anspråken i fråga om arrangemang. Hur som helst måste dock kongressarrangörerna ha en garantifond bakom sig. Under Stockholmskongressen 1934 hade närmare 200 personer tecknat garanti, och den förlust som uppstod, inkasserades efteråt. Men betydligt bättre är, om man i förväg har anskaffat en fond, tillräckligt stor att stå rycken. Och den garantin bör vara Propagandakassan!

I höstas meddelades i vår tidning, att en ny, modern propagandabroschyr förbereddes. Kostnaden beräknas bli rätt avsevärd, då utförandet måste göras förstklassigt. Det är Förlagsföreningen Esperantō som tagit initiativet, men det är säkerligen av vikt, att vårt förbund hjälper till. Var skall hjälpen tas? Ur propagandakassan!

På årsmötet i Hälsingborg i fjol uttalade man sig för att samla in pengar för utgivandet av en skollärobok i esperanto. Medel skulle anskaffas genom bildandet av en framtidsfond. Vilken är då denna fond? Jo, Propagandakassan!

Svenska Esperanto-Institutet har planerat utgivandet av en Esperantistens handbok. När freden kommit och ordnade förhållanden återuppstått, beräknas denna värdefulla handbok utkomma. Förbundet måste stå för sin del av utgivningskostnaderna. Aterigen: Propagandakassan!

*

Här ha några av de skäl medtagits, som visa på nödvändigheten att stödja Propagandakassan, avsedd till propaganda, kongressgaranti och fredsförberedelse.

Svenska Esperanto-Förbundets styrelse vädjar till klubbar och enskilda esperantister att under år 1944 göra en kraftanspanning för saken. Skulle ej varje klubb kunna anskaffa minst 50 kr.? Skulle ej de enskilda esperantisterna kunna bidra med exempelvis en dagsinkomst!

Den, som önskar fördela sitt bidrag på flera inbetalningar, antecknar sin inbetalningsplan på postgiropongen (t. ex.: lika mycket sändes 3 gånger ytterligare före den 1/10 44).

I nästa nummer av tidningen börjar redovisningen. Alla böra återfinnas på den listan. Insänd bidraget till Svenska Esperanto-Förbundet, postgiro 20 12, Stockholm.

Vi förvänta allas medverkan.

Styrelsen för SEF.

Kiu akceptos esperanton?

De F. Szilágyi.

La redaktejo antaŭ ne longe ricevis interesan kaj valoran leteron. Tiu letero diferencis de aliaj, ĝenerale alvenantaj leteroj tiurilate, ke ĝi malhavas la kutiman optimismon de la Esperantistoj. Ekzistas du tipoj en la Esperanto-vivo. La unua estas la fideluloj, kaj ili estas optimistoj. La aliaj estas tiuj, kiuj pro diversaj, plej ofte eksteraj kaŭzoj perdis la optimismon kaj forlasis la scenon. Sed la leterskribinto apartenas nek al la unua, nek al la alia tipo. Li sentas Esperanton kortrezoro kaj timas, ke ĝi ne estos sufiĉe forta, se ĝi venos en la krucfajron de la postmilita vivo. Ĉar ekzistas opinioj diversaj pri Esperanto principe, pri ĝi tute, aŭ pri ĝiaj detaloj, inter ili ankaŭ ne-favoraj. Ĉu rajte?

La letero estas pripensiga kaj estus kulpe ne okupi sin pri la honestaj kaj simpatiaj duboj, kiuj vekigis en la leterskribinto kaj kiuj povas ja vekigi en kiu ajn.

Generale.

Mi esperas, ke ni havos okazon okupiĝi ankaŭ pri la detaloj de tiu letero, sed unue ni parolu pri la ĝenerala parto. Kaj jen fakto: ke supozeble ne Esperanto, sed la internacia helplingva problemo estas nuntempe pridiskut-

ata kaj se oni batalas kontraŭ Esperanto, tio mem signifas gravan fakton: ke sub titolo "internacia, neŭtrala helplingvo" oni atakas ĝuste Esperanton. Kial? Ĉar ĝi reprezentas la "helplingvon", ĉar ĝi vivas kaj pruvis sian vivkapablon dum jardekoj, kiuj plejparte faris ĉion por la ekstremo de ĉiu internacia penso. Esperanto sendube atingis estimindan pozicion kaj ni scias, ke la ideo de la internacia, neŭtrala helplingvo eĉ tiam venkos, se oni enkondukos en la lernejojn iun aŭ alian nacian lingvon post la milito. La verkinto de tiuj ĉi linioj havis okazon dum la nuna studjaro gvidi kurson en iu studinstituto kaj spertis, kiel akre konturigis la kontraŭsento, atakanta Esperanton entute, en la koro de la anglaj instruistoj, tiel akre, ke tiu akreco mem donis al la subskribinto la senton de certa graveco. Kaj ke la rezultoj de duonjara Esp.-instruado eltenas ĉiun komparon al aliaj lingvoj, pri tio oni nun ne parolu. Ni ne plimultigu la vortojn. Parto de la atakantoj atakas pro simpla blindeco, ĉar mem la ideo ne estas tolerebla laŭ ili. Mi kredas, ke pri tiu ĉi temo red. Backlund parolis ofte.

La t. n. ideala ...

Kaj nun sekvas la dua parto. Esperanto mem ricevas kritikojn, aŭ estas ankoraŭ tria flanko de la konkreta problemoj kaj tio estas, ke fakuloj konstante okupas sin pri la t. n. ideala internacia lingvo. Ni parolu iomete pri la lasta afero. Antaŭ ne longe aperis ekz. artikolo de princo Trubetzkoi, kiu esploras la fonetikajn kondiĉojn

de la ideala internacia lingvo. Li konkludas — se mi bone memoras — pri 16 literoj, kies elparolo estas egale facila al ĉiuj popoloj. La penso estas tre interesa kaj teorie neatakebla. Sed pripensu kiel estus, se tia lingvo estus kreita kaj oni akceptus ĝin. Kiel aspektus la vortoj, kiu povus ilin rekoni? Ĉu tia eksperimento ne similus al la malnovaj projektoj, tute logikaj, sed praktike ne-uzebaj, aŭ en la plej bona okazo al Volapük, kiu finis jam sian rolon? Kaj jen la kerno de la afero! Oni povas trovi teoriajn plibonigojn, kiuj estas tre plaĉaj, sed en la praktiko plej ofte ili ne estas vivkapablaj.

La esenco.

Ne estas sence menciigi kelkajn aliajn pensojn, eblajn plibonigojn, ĉar tuj klariĝas, ke preskaŭ ĉie tumultas novaj malfacilaĵoj. Ekzemple oni povus pensi pri tio, ke la substantivo estu la tiel nomata bazformo kaj ĝi havu nenian finaĵon. Sed tiam tuj la akcentregulo perdas sian simplecon, aŭ se oni donus alian akcentregulon al la lingvo (t. e. akcentado de la unua silabo), oni malbeligus la lingvon per la akcentkunpuŝiĝoj. Tiu, kiu okupis sin pri Ido, kiel ankaŭ la leterskribinto, scias, ke ĝi estas pli malfacila ol Esperanto, ĝuste pro tio, ĉar oni klopodis pri teoria perfekteco. Ĝenerale oni do ne trotaksu la teoriajn proponojn; plej ofte la kritikoj estas tro unuflankaj kaj ne sperte firmigitaj. Iam mi havis kazon paroli kun unu el la plej grandaj aŭtoritatoj de nia lingvo, kiu resumis sian opinion en la jena eldiro: "Estas nature, ke oni povus pensi pri tio, ke iu, aŭ iuj el la pli novaj lingvoprojektoj en iu, aŭ alia rilato estas iomete pli perfekta(j) ol Esperanto, sed aliflanke Esperanto havas reciprokajn favoraĵojn kaj krome la vivon kaj la fakton de la evoluo, sian organizon kaj ĉiujn akcesoraĵojn, kiujn tiu fakto indikas kaj ilin oni ne risku por teoriaj aventuroj." La koncerna fakulo estis lingvisto. Li montras la esencon de la problemo.

Ne mumio.

Sed nun ni devas pensi pri alia afero. La kritikoj ja devas esti bonvenaj, ĉar — inter certaj, praktikaj kadroj — ni mem devas atenti, ke nia lingvo evoluu tiel, ke ĝi estu laŭeble perfekte praktika kaj perfekte kontraŭstara, bela instrumento. Ne tro perfekte bela, kaj ne tro perfekta en alia rilato, ĉar laŭ la homa naturo oni ne akceptos tian ilon en la rolo de lingvo. (Ankaŭ nun estas unu el la ĉefaj argumentoj kontraŭ Esperanto — kvankam maljusta — ke ĝi estas artefarita, senvive regula!) Ni do mem studu la lingvon kaj sarku ĝin kun la zorgemo de bona ĝardenisto. Kaj en tiu rilato ni povos havi okazon en sekva artikolo okupi nin pri kelkaj dubaj punktoj en la lingvo kaj pri kelkaj kritikoj, i. a. rimarkoj de prof. Jespersen.

Sed jam nun ni povas konstati, ke ne plu temas pri tio, ke iu aŭ alia profesoro povas antaŭdiri, ke Esperanto ne estos akceptita, ankaŭ profesoro Jespersen ne, ĉar Esperanto vivas. Kaj parto de tiuj riproĉoj, kiujn oni renkontas, venas el la fakto mem, ke ĝi vivas kaj la vivo malofte estas barebla per barieroj. Mumioj restas en siaj "mumiujoj", sed oni vane metus vivantan homon en tian ujon. La vivo ĝis nun emis akcepti Esperanton kaj ni prizorgu, ke el niaj semoj maturiĝu spikoj. Kun zorga atento ni zorgu pri nia plugteroj. Kaj tial ni ne timu la kritikon realan. Sed pri tio poste. F. Szilágyi.

IEL-s årsbok 4:— kr. (Cefdel. K. Wästfelt).

IEL-s årsbok och tidning 8:— kr.

GEEDZIGO.

Folke Carlström kaj Maj Ericson, Uppsala.

NASKIGIS.

Filino

Majken, naskita Ewert, kaj Olov Johansson. Östervåla 15.2.1944.

Sigvard kaj Inga Håkansson, Stockholm ricevis filinon Viveka.

Fileto

Margit kaj Gunnar Svensson, Östersund.



†
G. O. Karlsson

La fidela G. O. Karlsson ne plu ekzistas. Dimanĉe la 13-an de februaro 1944 la multjara, korpdetruanta malsano estingis lian vivflamon.

G. O. Karlsson estis fidela esperantisto kaj dum multaj jaroj li kun grandega intereso kaj brila energio faris sian plejblon por nia lingvo. Jes, de post 1939, kiam li translokiĝis de Stehag, kie li estis popollerneja instruisto, al Eslöv, kie li volis ripozi post siaj klopodoj, lia preskaŭ sola intereso estis Esperanto, kaj netakseblaj estas liaj klopodoj por la klubo en Eslöv. Kiel multjara prezidanto de la skania distrikto mi persone sentas dankemon al G. O. Karlsson, kiu ĉiam sekvis nian laboron en ĉiujpecaj formoj.

Parolante pri G. O. Karlsson oni nepre ne forgesu menciigi lian plej gravan lingvan intereson: La poezio. En la lastaj 5—6 jaroj li speciale favoris la poezion de Evert Taube, kiun li tradukis kaj ofte prezentis en niaj rondoj. Kun bona talento li kaptis la poezian sencon kaj ĉiam majstris la metrikon. Estus interese iam povi kolekti liajn poeziaĵojn. Li meritas, ke pli granda publiko sciui pri lia talento.

Granda truo en la esperantista amikaro. Sed en la truo kresku la verda stelo kun kvin pintoj memorante pri nia fidela samideano.

Li ripozu en paco. Ni danku lin por liaj faroj.

Str.



†
Gunnar
Furhammar

Pastor Gunnar Furhammar avled den 5 mars på Falu lasarett av hjärtfel. Han var född i Småland och hade nyss fyllt 48 år. Sedan han avlagt realskoleexamen var han en tid sjöman och en tid typograf, varefter han genomgick Missionsskolan och ägnade sig åt predikantens kall. I 16-år har han varit anställd i Dalarnes Ansgarieförening som resepredikant.

Furhammar var en mycket verksam esperantist. Han förde en livlig korrespondens med esperantister i mer än 60 länder. Brevväxlingen med en katolsk präst utgav han i svensk översättning under titeln "Katolik eller protestant".

På esperanto har Furhammar utgivit "La religiaj cirkonstancoj en Svedujo" och en bok om Stanley Jones och hans budskap under titeln "La homo kiun miliono aŭskultas".

Ĝia sedan den svenska sektionen av Kristana Esperantista Ligo Internacia bildades, har Furhammar stått som dess ordförande. Genom hans bortgång förlorar sektionen sin verksammaste kraft.

A. W.



Meddelande från Esperanto-Institutet

Examensskrivning 19 mars. Anmälningstiden utsträckt till den 12 mars.

Sommarträff under semestern. 2 olika esperantoveckor.



GRANEBO, Norrköpings Esperantoklubbs sommarhem.

Föregående sommar kunde institutet bjuda på ett gediget "Sommaruniversitet" i Lund och Malmö. I år blir det enklare arrangemang, men därför säkerligen inte mindre välkommet för esperantisterna. Institutet har nämligen överenskommit med två esperantoklubbar om anordnande av sommarträff under angenäma former.

För den ena av sommarens esperantoveckor svarar Amotfors esperanto-klubb, som redan i fjol förvärvade erfarenheter vid sommarkursen på Björkås i Dalsland. Björkås är beläget i en av Dalslands vackraste trakter med tillfälle till bad och utflykter. Institutet planerar ett antal föreläsningar om och på esperanto. Men samvaron är först och främst avsedd att ge deltagarna tillfälle till samvaro med andra esperantister och till verklig semestervila. Veckoprogrammet kommer därför ej att göras betungande. Inlogering blir liksom i fjol på Björkås pensionat, som väl liksom hittills bjuder på förstklassig mat. Pensionatspriset beräknas till 6 kr. pr person och dag. Denna esperanto-semester blir i samband med midsommaren, 23 juni—2 juli.

Den andra möjligheten till esperanto-semester erbjudes av Norrköpings Esperantoklubb i sitt ägandes som-

marhem Granebo under tiden 16—23 juli. Även denna plats, belägen i den vackra Kolmården, ger tillfälle till bad i omedelbar närhet. Inlogeringen blir i sommarhemmet, som kan ta emot ung. 15 gäster. Kostnaden för mat och logi beräknas bli endast omkr. 4 kr., men inlogeringen är förstas enklare än på ett pensionat. Programmet upptar, liksom på Björkås, föredrag om och på esperanto.

Tältplatser kunna ordnas på bägge ställena för dem som önska på detta sätt klara inkvarteringsproblemet.

För vardera semesterveckan upptas en deltagareavgift av 5 kr. för att täcka kostnaderna för arrangemang, föredrag o.s.v.

Nästa nummer av tidningen kommer att innehålla utförligare detaljer rörande programmet, om tid för anmälan o.s.v. Men planera redan nu ert deltagande! !

Esperanto-examen.

Glöm ej att delta i skrivningen den 19 mars, om Ni ej redan tagit examen!

S E I F Spalten.

La novaj raportblankedoj nun estas elsenditaj al la grupoj. La grupoj kaj distriktoj ricevis raportkartojn, kaj por la pretigo de la matrikulo estas grave ke ili baldaŭ resendas la kartojn kun kompletaj scilgoj. Alie la matrikulo enhavos neaktualajn scilgojn.

En marto aperos la matrikulo. Gi estos stencilita kaj enhavos adresojn de la federacia estraro, de distriktoj kaj grupoj, de grupoj kaj rektaj membroj. La grupoj ricevos 3, distriktaĵ estraranoj kaj rektaj membroj 1 ekz. Vi povas ankaŭ antaŭmendi plurajn ekzemplerojn per pago de po 20 öre al nia poŝtkonto 20 12 (menciu pri kio temas).

S a l e x .

OMBUDSMANNEN avreste den 1 febr. till Uddevalla för att få avtal om föredrag med militära myndigheter och fortsatte sedan till Strömstad, där han 2.2 höll föredrag och provlektion inför militär publik samt 3.2 inför skolklasser ("Pro malgranda ejo oni devis 3-foje ripeti paroladon"). På kvällen samma dag ny militärpublik vid föredrag och provlektion någonstans. Nu följer en rad

besök med föredrag i militärföreläggningar, så att vi få hoppa över ortsnamnen, till dess ombudsmannen den 8.2 gästar Föreläsningssällskapet i Mustadfors samt den 9.2 Dals Långed och Bengtsfors. Den 11.2 höll han 2 skolföredrag i Uddevalla och höll esperantolektion med hr Dahls barnkurs.

Den 13.2 deltog han i Amål-esperantisternas ordinarie söndags-klubbmöte och samlade 14.2 en mycket stor åhörarskara vid föredrag i Samrealskolan. Resan gick sedan över Karlstad till Kristinehamn med (15.2) 3 gånger upprepat föredrag i folkskolan och ett i Komm. flickskolan. — Den 16.2 ledde hr Morariu "Rumana vespero" i Stockholmsklubben.

Den 17—18.2 besöktes Uppsala (4 föredrag) och dit återvände han 21.2 för ytterligare 3 föredrag. Den 22.2 närvar han vid förbundsstyrelsens möte och rustade sig för resa norrut.

Ombudsmannen har då detta skrives besökt Krylbo (2 ggr)—Borlänge—Falun—Gävle och Sandarne samt meddelar att hans adress är Kristliga Folkhögskolan, Härnösand, varifrån brev eftersändes till de platser i övre Norrland, dit han kallats. — Obs. adressen!

Redovisningen för Ombudsmannafonden hinner ej in förrän i aprilnumret.

Från Förlagsföreningen.

EN SUCCÉ blev de små propagandabladen "Om språkstudier" och "Världens åttonde underverk". De gingo åt så hastigt, att vi blevo av med dem långt fortare än beräknats, och en del rekvisitioner ha därför måst läggas åt sidan. Nu har 2:a fördubblade upplagan utkommit. Har ni inte tidigare rekvirerat eller har bladen tagit slut för er; rekvirera nu. Många ha tagit fasta på vårt påpekande att dessa små blad äro utomordentligt lämpliga att jämt bära med sig i fickan för utdelning eller kvarlämnande på lämpliga ställen, såsom i tåg, bussar, väntrum el. dyl. För 1 kr. får ni 50 st., så billiga äro de — tvekar ni då?

*

"LATINETS ARVTAGARE — nationalspråkens jämlike" — lika lockande som titeln är på detta Institutets första nummer i den tilltänkta serien om olika skrifter, lika begärlig har den visat sig bli. Dess propagandabetydelse har klart insetts och dess rikedom på argument högt uppskattats. (Pris 1:— kr.)

*

En liten nyhet: VÄGGALMANACK 1944 med text på esperanto och bulgariska. Endast ett 10-tal ex. finnas. Pris pr st. inkl. porto och oms. 1 krona.

*

VI UPPREPA vår påpekan i februarinumret om att "Nylén-boken" numera kostar bara 2 kr. Den boken kan ju inte få saknas hos någon svensk esperantist åtminstone.

ESPERANTO-TIDNINGENS abonnenter äro lika tröga som andra tidningars. I december varje år sända vi alla abonnenter ett inbetalningskort för förnyelse. Endast nätt hälften av dem använda det. Men vi sända ändå tidningen för både januari och februari till alla föregående års prenumeranter — vi tro ju att de alla ska komma tillbaka. Ett särskilt cirkulär i februari blir en ny påminnelse — men också en onödig utgift för oss — och resultatet av detta blir alltid rätt gott långt ifrån fullgott. De som ej förnyat i och med februari bli avförda utan vidare. Men då börja andarna vakna ... Det skulle bespara oss mycket arbete om förnyelsen skedde vid årsskiftet.

KULTURA FRONTO

FRISTAD. Kontakte al la esp.-kurso en la Popol-altlernejo, la 4-an de marto okazis "Hungara Vespero", gvidata de d-ro F. Szilágyi. La svedlingva prelego pri Hungarujo donis abundan okazon por Esperanto-propagando. La publiko konsistis el ĉ. 150 personoj. Krom la danke akceptita prelego (kun lumbildoj) kontribuis al la programo s-ino Anna Bengtsson, mag. R. Bengtsson, rektoro B. Rostall per delikate prezentitaj muziknumeroj (Berlicz: Rákócz-marŝo, Brahms: Du hugaraj dancoj; Kéler: La filo de la stepo) kaj unu el la partoprenantoj de la Esp.-kurso, Rune Johansson deklamis la poemon de B. Gripenberg "Rákóczys rytarmarsch".

Ĉu vi volas koni vian landon?

Aĉetu do:

Stockholm, 32-paĝa broŝuro kun multaj ilustraĵoj.

Vermlando, 32 paĝoj, priskriboj de la plej belaj lokoj en la fama provinco. Belaj fotografajoj.

Lappland. Plej norda Svedlando kaj Norvegujo.

— En la sama kajero: Kun esperantistoj sur Gotland kaj dana Selando. Ilustrita.

Uppsala. La priskribo pri tiu urbo, unu el niaj plej malnovaj, estas interesa kaj bele ilustrita.

Prezo por ĉiuj kvar entute inkl. imposto kaj afranko kr. 1:25.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO
Fako 698, Stockholm 1. Poŝtgiro 578.

LINGVAJ DEMANDOJ

MAL-VORTOJ.

La mal-vortoj apartenas al la plej pridiskutitaj detaloj de nia lingvo. Sendube ili donas faciligon, oni ja ŝparas vortlernadon per ili, sed aliflanke oni volonte liberigis de parto de la mal-vortoj pro diversaj kaŭzoj. Varinghien ne ŝatas la mal-vortojn ĝenerale, ĉar laŭ li ekz. la vorto malvarma elvokas la senton de la varmo kaj speciale en la literaturo ilia uzo estas perforta. Laŭ mia opinio tiu argumentado ne estas justa, same ne kiel tiu, kiu donas tro fortan rolon al la sonefiko de la vortoj en la naciaj lingvoj, ekz. kiu kredas, ke k a r l e k pro sia sono devas esti la plej perfekta vortrespeguliĝo de la koncerna sento. Aliaj opinias grandan parton de la mal-vortoj mis-gvidantaj kaj inter la riproĉitaj mal-vortoj fakte estas kelkaj, kiujn oni klopodas anstataŭigi per novaj vortoj. Povas okazi, ke mal-vortoj tumultiĝas, ekz. malplej malbone kaj tio povas esti unutona. Oni diras, ke la mal-vortoj ne parolas ĉiam klare al la percepto. Ekz. kiam oni diras, bonvolu iri maldekstren, oni ofte iras dekstren.

Sen troa konservativeco ni ne kondamnas la mal-vortojn. Koncerne la miskomprenojn, mi memoras epizodon: Foje ni kelkaj estis en la loĝejo de d-ro K., kiu pledis por la malpliigo de la mal-vortoj, ĉar ... ktp. Ankaŭ li uzis la ekzemplon dekstren-maldekstren kaj diris, ke en kritikaj situacioj povas esti dangere, se oni ne sufiĉe rapide perceptas, pri kiu direkto temas. En la ĉambro, kie ni estis troviĝis du fenestroj: unu estis malfermita, la alia fermita. Mi diris al unu el ni: Bonvolu fermi la fenestron. Mi ne diris tion Esperante, sed en nia gepatra lingvo, en kiu du tute ne similaj vortoj ekzistas pri la du funkcioj. La alparolito iris al la fermita fenestro kaj malfermis ĝin, anstataŭ fermi la malfermitan. Jen, mi diris triumfe. Kontrastoj en si mem provokas unu la alian kaj supozeble la mal-vortoj tiurilate ne estas pli riskaj ol multaj opinias. Malgraŭ tio la vivo kreas ofte vortojn, kiuj estas uzataj paralele kun la malvortoj, aŭ iĝas nuancaj vortoj kaj se tiaj vortoj estas vivkapablaj, ili enradikiĝas kaj fine ricevas la aprobon de la Lingva Komitato. Oni pli ofte uzas la vorton "diversa" apud la malpli ofta "malsama" kaj tiaj ekzemploj ekzistas amase. Por "maldekstra" oni ja proponis "sinistra", sed ĝis nun la propono ne havis sukceson. La vorto "malfermi" apartenas al la plej diskutitaj mal-vortoj kaj ne senkaŭze, ĉar la baz-vorto ne respondas al pozitiva funkcio; oni pli volonte akceptus la funkcion de la malfermo kiel unuan. Sed ankaŭ en tiu rilato oni ne povas diri, ke la proponita vorto 'aperti' tute ekvivis. Tamen en la literaturo, kvankam sporade, ĝi aperis jam kaj kelkaj verkistoj uzas paralele kun la formo "malfermi". La vorto mal-multekosta eble ne estas tre plaĉa, kaj ankaŭ ĝi havas siajn malamikojn, kiuj eksperimentas pri la vorto "malkara". (Kial ne?) Sed ekzistas ankaŭ alia solvo: malkosta, kiu estas akceptebla. Sufiĉas ke ĝi respondas al relativa logikeco. Tro rigidan logikon ni ne serĉu. Ĉiukaze la mal-vortoj ekzistu, kiel helpiloj por la, ne ĉiam korekte funkcianta memorkapablo! Sed se oni volas nepre eviti ekz. la vorton malsupre(n), oni trankvile povas uzi la ne miskomprenblan "sube(n)" kaj similajn solvojn.

La tumultiĝo de la mal-vortoj estas ja ŝatata ĉevaleto de la kontraŭesperantaj apostoloj. Sed pripensu kiomfoje tiaj tumultiĝoj okazas en la nacia lingvo. En la franca lingvo kelkfoje tri-kvar "de"-oj turiĝas unu super la alian. Ĉu grave? Tute ne.

F. Sz.

LINGVA KONKURSO. Vidu paĝon 24! !

Norda Literaturo.

Kolekto de literaturaj verkoj el Norda Eŭropo.

Noveloj el latva kaj estona lingvoj. 84 paĝoj.

Prezo kr. 1:15 inkl. imposto kaj afranko.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Fako 698, Stockholm 1. Poŝtgiro 578.

SVEDA KRONIKO

KELI-JARKUNVENO.

La sveda sekcio de la Kristana Esperanto Ligo Internacia KELI havis sian jarkunvenon la 18 febr. en la misia preĝejo Valhalla, Stockholm. Per la Esperanta Himno ni malfermis la kunvenon kaj poste ĝardenisto G. Wollmer, Tungelsta, legis psalmon 23 kaj gvidis preĝon. Redaktoro A. Wallin gvidis la jarkunvenajn intertraktojn. La estraro por la venonta trijara periodo konsistas jene: Pastro G. Furhammar, Falun, prez., Anna Alamo, Stockholm, vicprez., Ivar E. Karlsson, Leksand, sekr., A. Wallin, Stockholm, kaj H. Dahlin, Spånga. Anstataŭantoj Astrid Ljungberg kaj K. E. Strandberg, Stockholm. Kasisto estas Estes Medin, Flen, kaj eldoneja ĉefo A. Wallin, Stockholm. El multaj lokoj en Svedujo alvenis leteroj, kiuj montris al ni, ke la intereso ĉe niaj membroj estas granda malgraŭ la nekonvena tempo. Eĉ el Holando kaj Francio alvenis salutoj, kiuj tre ĝojigis nin. En Francio la esp-istoj kuraĝe laboras ankaŭ nun dum la terure malfacilaj militempoj. Tio instigu nin al fidela laboro, dum ni atendas pli helajn tagojn. Ĉar ni ricevis eblecon ion transsendi al esperantaj amikoj en Holando ni dum la kafo kolektis sumon por tiu celo kaj transdonis ĝin al Anna Alamo, kiu prizorgos la sendadon. Dum la jaro ni sukcesis elsendi nian gazeton "Dia Regno" al multaj anoj en diversaj landoj, sed la plej multaj ja ne havas eblecon ĝin pagi, tial ni ĉi tie devas donaci ĝin, por ke ili ricevu ĝin ankaŭ estonte. Kun danko ni ricevis dum la jaro de kelkaj membroj monon por tiu celo kaj ni esperas, ke ankaŭ dum la nuna jaro same okazos. En fido je Dio kaj kredo al nia tasko ni senlace laboru pluen!

Anna Alamo.

Esperantista klubo de HALMSTAD jarkunvenis la 3-an de febr. en la ejo Brogatan 43. Oni elektis la jenan estraron: John Ahlström prez., T. Claesson vicprez., Allan Bengtsson sekr., Lars Johansson vicsekr. kaj John Nilsson kas. Revizoroj fariĝis s-inoj Wirie Ahlström kaj Greta Bengtsson. — La tradicia jarfesteno de la klubo okazis sabate la 19-an de febr. en hotelo Svea. Ankaŭ multaj ne-esperantistoj ĉeestis, kaj por ili la agrablega festeno en la signo de Esperanto estis bona instigilo lerni la lingvon. Per kantado de nia himno finiĝis la memorinda vespero.

Ruben Enocson.

KARLSKOGA. Dimanĉe, la 6-an de febr. Karlskoga Esperanto-Socio "La Aglo" havis sian XI-an jarkunvenon en la Kluba Ĉambro de Karlskoga Urba hotelo. La rapor-

toj montris ke la vivo en la klubo dum la pasinta jaro estis vigla kaj multedona. La ekonomia stato estis pli grandigita dum la jaro kaj estas nun tre bona. La klubo laboras, krom kunvenoj du foje monate, ankaŭ per kursoj por komencantoj kaj daŭrigantoj, kiuj enhavas po ĉirkaŭ dekdu partoprenantoj. Dum la kunvenoj inter alie du anoj alterne prelegas pri Esp.historio kaj literaturo. La ekstera propagando konsistas ĉefe de persona influado sed krom tio de du reklamskatoloj, en kiuj ni montras aktualajn bildojn, leterojn kaj gazetartikolojn ktp., kiuj atestas por Karlskoganoj ke Esperanto vivas kaj funkcias. La estraro por 1944 ricevis jenan kunmeton: prez. R. Lindahl, vicprez. A. Bern, sekr. K. Franzon, vicsekr. S. Södergren, kasisto H. Björn, alsidantoj Thyra Jäwert kaj S. Bergwall, revizoroj E. Bonander kaj A. Axelsson. Reprezentanto por Eld. Soc. Esp. A. Leijder kaj kiel delegito por IEL E. Bonander.

La jarkunveno daŭrigis kun tesupeo, kiu estis sufiĉe vigle partoprenata. La tetrinkado kaj la gaja parolado estis rompita de temp al tempo de esp.-aj kaj svedaj paroladoj, sol- kaj komuna kanto kaj kanto de kvarteto. La gaja kunestado daŭrigis kun dancado ĝis la 24-a horo.

L & L.

MALMÖ. 31.1. Jarkunsido en la Studhejmo, kiu estis gvidata de s-ro Erik Olsson. Laŭ kutima maniero li korekte kaj rapide pritraktis la punktojn de la tagordo. La jara raporto, kiu estis sufiĉe ampleksa kaj enhavoriĉa, esprimis dankon al la klubanoj, kiuj ĉiuj en sia loko faris sian plej bonan por la klubo kaj ĝia bonstato. Ĝi finis per ĉi tiuj instigaj vortoj: "Ni svedaj esperantistoj estas la malmultaj en la tuta mondo, kiuj dum la nuna tempo rajtas labori por nia afero, ni montru ke ni ankaŭ povas fari ion. Eble la lasta militjaro komenciĝis kaj ni esperas, ke tiel estu."

La estraro estis reelektita: Jan Strönne prez., Oscar Runerheim vicprez., Ester Andrén sekr., Hildur Wallin vicsekr., Gösta Henriksson kasisto, Wilhelm Johansson bibliotekisto kaj arĥivisto, Helge Andrén kaj Erik Fredin klubmastroj. Sixten Clausson studgvidanto. Anstataŭantoj: Erik Olsson kaj Hjalmar Andersson. Revizoroj: Maria Persson kaj Hilbert Hansson. Kiel redaktoro por la klubgazeto "La Folio" Ester Andrén estis kun dankemo reelektata. Raportantoj por gazetoj: Hildur Wallin kaj Wilhelm Johansson. Delegitoj por IEL: Ĉefdelegito Hilbert Hansson, helpantoj: Olga Malmborg kaj Gösta Henriksson. Ĉe la jarfino la klubo havis 101 membrojn.

9.2. Prelego de s-ino Helga Atlas pri "Vojaĝo al Oriento kaj Mediteraneo". Ege belaj lumbildoj sekvis la paroladon. Poste hispana muziko de prelegantino kaj kanto de f-ino Lundborg.

H-dur.

Grupo Esperantista de STOKHOLMO. Jen raporto pri la programo dum februaro. La 2-an redaktoro Nylén rakontis pri sia korespondado kun s-ro Hansander. La 9-an ni studis leteron de Esperanta Studservo. La 16-an de februaro ni havis Rumanan vesperon. Redaktoro Morariu parolis pri la rumana literaturo kaj legis kelkajn novelojn kaj versojn de la rumana verkistoj Sadoveanu kaj Toparceanu. Sinjorino Pelz legis poemojn kaj kantis rumanajn kantojn. Poste oni montris du filmojn, unu pri la rumana oleo-fontoj kaj unu pri la rumana popol-dancoj. La filmoj vekis grandan intereson. Kiam ni poste sidis ĉirkaŭ la kaftablo la sindiko rakontis pri sia laboro ĉe diversaj lokoj en la lando. La 23-an ni festis superjaron feston. La knabinoj solaj prizorgis la tutan programon. En la bele ornamita salono oni legis kaj ludis. S-ino Julin salutis la ĉeestantojn kaj fraŭlino Olsson laŭlegis du noveletojn. Poste oni ludis du skeĉojn: Profesoro Forgesulo kaj Ĉe la dentisto. La aktoroj estis Gun Gerdman, Kerstin Alexandersson, Sonja Händel kaj Eva Petersson. Fraŭlino Broberg ludis pianon kaj dumtempe ni kolektiĝis ĉirkaŭ la kaftablo. S-ro Magnusson kantis akompanita de s-ino Julin. Poste komencis la danco kiu daŭris ĝis la 23,30 horo. Fine mi nur diras koran dankon knabinoj por ĉarma vespero.

Tg.

För att bereda dem, som ännu ej haft tillfälle att skaffa sig den ypperliga boken

"50 jarojn kun Paul Nylén"

möjlighet härtill ha vi beslutat att å den del av upplagan som ännu återstår

NEDSÄTTA PRISET FRÅN KR. 4:—

TILL KR. 2:—

(vartill kommer oms. och porto).

Boken, som i korta drag skildrar den svenska esperantismens utveckling under de senaste 50 åren, är med sina över 100 illustrationer ett värdefullt förvärv och bör ägas av varje esperantist.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO
Fack 698, Stockholm 1. Postgiro 578.

AMAL. 21.11 vizitis la sindiko nian lokon. Li ĉeestis nian studkunvenon kaj parolis i. a. pri sia restado en sveda malsanulejo. La sekvan tagon li prelegis, kaj en 'a altlernejo kaj en la popol-lernejo pri "Rumanio, la lando de l' oletrovaĵoj". Aperis notoj en la ĉilokaj gazetoj pri lia vizito. La artikolo de Entrich pri Basic English aperis ankaŭ en Amalstidningen. 12.12 la bravaj samideaninoj Gun Bellberg kaj Nel Karlsson invitis nin al Luĉiofesto. Partoprenis ĝin ankaŭ Morariu, kiu per gajaj historioj kunhelpis fari la vesperon interesa. Ankaŭ la 13an la sindiko ĉeestis nian studkunvenon. Li estis survoje al Säfte kaj nur preterire vizitis nin. Kun granda intereso ni aŭskultis al lia prelego pri Rumanio. Post la finiĝo de nia studkunveno s-ino Gun Mellberg invitis nin al sia hejmo, kie ni trinkis kafon, diskutis, kantis kaj pasigis agrablan vesperon. Espereble pliaj novaĵoj venos de nia loko.

E. G.

ÖREBRO Esperantoförening avhöll sitt 21-a årsmöte i Folkets Hus fredagen den 4 febr. 1944. Styrelsens och revisorernas berättelser föredrogos och godkändes.

Av årsberättelsen framgår att intresset för esperanto synes blivit livligare, då Örebroföreningen nu i medlemsnumerär blivit den tredje i ordningen av landets esperantoföreningar.

Styrelsen för 1944 fick följande sammansättning: Ordf. Johnny Hollberg, sekr. Olov Eliasson, kassör Harry Hultén, v. ordf. Mauritz Axner, v. sekr. Ragnar Oskarsson, bibliotekarie John Blomqvist, materialförvaltare Teodor Karlén, ombud för Förlagsföreningen Olov Eliasson, för ABF Mauritz Axner, för ETK Ebba Dahlberg.

KONKURSO.

En nia lasta numero trafis nin grava malfeliĉo. Tuta artikolo ensteliĝis en la presmaŝinon sen la necesa korrektado. Alivorte, ni lasis al la preserara koboldo movo-liberon. Ĝi devas esti skurgita pro sia malbonkonduito, kaj ni nun petas nian legantaron kunhelpi.

Kiel niaj legantoj certe jam scias, temas pri la artikolo "Vortfiguroj" de dro Szilágyi, kaj ni invitas vin forbalai la malordon de la koboldo. Ni do proponas, ke vi traserĉos la artikolon notante la preserarojn sur leterkarto, kiun vi bonvolu ensendi al la red. Tiu, kiu trovos la plej multajn preserarojn ricevos premion. Ankaŭ tiu kiu venas numero du. Kaj ankaŭ la tria. Ni esperas, ke restos nenio, pri kio la preserar-koboldo povas fieri. La red-adreso estas: Box 698, Stockholm 1.

Sveda Instruista Esperanto-Federacio (Svenska Lärares Esperanto-Förbundet)

Fågelfångaregatan 20
Telefon 14 93 43

Göteborg V
Postgiro 3 14 30

Skriv på Esperanto-post!

- 50 st. brevpapper, linjerade, 22,5×28,5, o.
- 50 st. kuvert med esp.-stjärna och text "Esperanto — Internacia lingvo" .. kr. 2:50
- 10 ,, brevpapper och kuvert med Esperantostjärnan och text "Esperanto — Internacia lingvo" ,, 0.70
- 10 ,, d:o, hamrat papper ,, 0.80
- 10 ,, brevkort med reklamtext ,, 0.40
- 10 ,, vykort, fotografi, med olika bilder och Esperanto-text ,, 1.25

15 % tillägg för porto och oms.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO,

Fack 698, Stockholm 1.

Svenska Esperanto-Tidningen La Espero

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Postadr.: Box 698, Stockholm 1.

Redaktör: Eva Julin, Gps I a, Sthlm.

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Prenumerationspris Från 1943: helt år kr. 4:—, Lösnummer 0:35. Utkommer en gång i månaden.

Annonspris: 20 öre pr mm. Korrespondensannons: 1:50.

Expedition: Förlagsföreningen Esperanto, Sveavägen 98, Stockholm. Tel. 31 65 01. Postgiro 578.

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET (Sveda Esperanto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Postgiro 20 12.

Avgiften i SEF: Direkt anslutna medlemmar erlägga 7:50 kr. pr år och erhålla tidningen gratis. Föreningar erlägga för varje medlem en årlig avgift av 2:— kr. Varje ansluten förening erhåller ett exemplar av tidningen gratis.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO u. p. a., postadress: Box 698, Stockholm. (Expedition: Sveavägen 98.) Tel. 31 65 01. (Förlagschefen: 10 53 27). Postgiro: 578. (Böcker, tidningar, korrespondenskurser o.s.v.).

SVENSKA ESPERANTO-INSTITUTET, Tegelbacken, Stockholm. Postgiro 5 15 11.

INTERNACIA ESPERANTO LIGO — IEL (Sveda Teritorio): Cefdelegito Karl Wästfelt, Cedergrensvägen 27, Stockholm 32. Postčeka konto 15 12 88. Kotizoj: Membro kun jarlibro kr. 3:—; Membro-Abonanto 8:—; Membro-Subtenanto 20:—; Patrono 80:—.

Printempa trilo.

Kantebla laŭ la sveda melodio:
"Flicka från Backafall".

Neĝ malaperas, forfluas al maro
ĝi nun, dum kantas en ĉiu river.
Koroj eksaltas — denove esperas
pri la printempo, la ĉarma somer.
La nigraj sturnhoroj en arboj fajfadas
kaj super la kampoj — alaŭdoj jam
per etaj sed fortaj flugiloj flirtadas,
kantante al suno, al vivo kaj am.

Ekvenis denove la festo natura,
la festo de l' verdo, de l' floro kaj kant.
Ho temp, kiam eĉ la homo matura
eliras kaj miras kaj — agas en vant!
La floroj, la birdoj, la sun super ĉio
nin logas kaj tiras al kampo, arbar.
Ni emas denove per kant, poezio
elvoki, elverŝi el kora sonar!

Ekbrilas nun ĉie la verda koloro,
la Stela koloro — kolor de l' Esper!
Ĝi iru — inspiru nin ĉiujn en koro
pri alta destino kaj celo sur ter:
Forigi malpacon kaj la malkomprenon
per ilo de l' Majstro donita al ni,
ke iam ekvivos la homoj matenon
de plena feliĉo — de tutharmoni!

Valde Printemp.

REDOVISNING.

Följande bidrag har influtit till Pressinformation sedan en mera systematisk, ej på abonnemang byggd insamling börjat:

Rudolf Pehrsson 10:—, Albert Björnemo 12:—, K. J. Moberg 11:—, T. Nordlöf 10:—, Edit Bohlin 8:—, Hjalmar Kihlberg 5:—, Adolf Ahlgren 2:50.